Seminario pri Esperantaj arkivoj kaj bibliotekoj

(Herzberg, Germanio, 8a-10a de aprilo 2005)

Iniciate de Interkultura Centro Herzberg estis organizata kunveno por interkonsiliĝi pri la estonteco kaj mastrumado de esperantaj arkivoj kaj bibliotekoj. Dum la pasintaj jaroj kelkaj pioniroj forpasis kaj estas malmulta interkonsiliĝo inter la multaj kolektantoj de Esperantaj dokumentoj. Plej multaj el ili eĉ ne konas la ceterajn.

Ĉeestis dekunu partoprenantoj: naŭ el Germanio, unu el Belgio kaj unu el Litovio. Du hungaroj devis rezigni lastmomente.

Supervido de la problemaro (Detlev Blanke)

La plej freŝdata detala kaj fidinda denombrado de esperantaj bibliotekoj datas el 1980: 'Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj' de Marinko Gjivoje, Zagreb.[1] La lasta grava kunveno pri tiu temo dum universala kongreso okazis en Vieno en 1992. Arpad Mathé iam komencis inventaron, sed tiu tasko neniam finplenumiĝis.

Estas tute malklare kiom da grandaj Esperanto-kolektoj ekzistas. Gjivoje nombris 31 da ili en 21 landoj (kriterio: almenaŭ 1000 libroj). Mathé trovis 120 en 30 landoj.

Internacia kunlaborado estas kvazaŭ neekzistanta. Provo al kreo de interŝanĝosistemo por mankantaj ekzempleroj ne sukcesis. Nek la Esperanto-movado kiel tuto, nek la gvidantoj de la grupoj konscias sian responson pludoni la informon al la venontaj generacioj. Interne de la movadoj apenaŭ estas profesiaj bibliotekistoj kaj arkivistoj.

Jen la bazaj atentendaj principoj :

- konservi la jam faritan laboron
- ne nur kolekti, sed ankaŭ ordigi
- disponigi la kolekton al uzantoj (ankaŭ ekster la esperantistaro)
- pludoni la kolekton al la venontaj generacioj

Rilate ĉi-tion lastan grandaj kolektoj endanĝeriĝas, ĉar la intertempe forpasintaj fondintoj ne sukcesis trovi la taŭgan solvon. La kolekto de Károly Fajszi (1911-2004) havas fidindan novan mastrumanton. Du ankoraŭ vivantaj kolektantoj jam aranĝis la transdonon de sia kolekto: tiu de R. Haupenthal iros al Katholische Universität Eichstedt, tiu de D. Blanke al Bundesarchiv Berlin.

Tamen jam kelkfoje konstatiĝis, ke kolekto konsiderita 'sekure lokumita' ja endanĝeriĝis, ĉar post kelka tempo la mastrumanto ekhavis aliajn prioritatojn.

Situacio de kelkaj bibliotekoj

Hamburg (Benno Klehr)

La unua Hamburga Esperanto-grupo estis fondata en 1904.[2] Antaŭ la dua mondmilito la kolekto estis disdonita inter la anoj. En 1946 la grupo estis refondata kaj la biblioteko rekolektata. Post kelkaj translokiĝoj la biblioteko nun havas stabilan lokiĝon. En 1993 estis farata katalogo en *dBase*. Intertempe tiu estas transformita en *Excel*, sed post la lasta

transformo kelkaj problemoj restas nesolvitaj: la alfabeta ordigo estas problema kaj ne plu estas serĉekrano. Ankaŭ ekzistas surpapera katalogo. Por interrete publikigi la katalogon la nuna responsulo ne sin konsideras kapabla.

Aalen (Detlev Blanke)

La situacio jam estis malfacila kaj depost la forpaso de Adolf Burkhardt ne plu estas kontaktpersono.

Wenen (Detlev Blanke)

Nun la kolekto estas translokata de Hofburg al malpli prestiĝa, sed certe same taŭga loko en Vieno.

Hungario (Zsófia Kóródy)

Károly Fajszi (1911-2004) ekkolektis nur post sia emeritiĝo. Komence li sin limigis al kelkaj subjektoj, sed fine lia kolekto kreskis al unu el la plej grandaj en la mondo. Li mem kunmetis surpaperan katalogon. La kolekto estas nun konservata en Landa Fremdlingva Biblioteko; la responsulo estas bode.ilona@oik.hu. Informo pri la kolekto troviĝas ĉe http://www.oik.hu/eszperanto/gyujtemeny.htm (en Esperanto). Parto de la kolekto jam estas rete konsultebla ĉe http://www.oik.hu/menu/smweb.htm (nur en la hungara). Temas pri 'finita' kolekto, al kiu nenio plu estos aldonata.

Aliloke en la lando la hungara Epseranto-asocio donace ricevis konstruaĵon, kie la arkivoj estas konservataj. La konstruaĵo fakte estas tro granda por esti mastrumata kaj bontenata de la asocio.

Kortrijk (Roland Rotsaert)

La jam menciita libro de Gjivoje donas bonan impreson pri la origino kaj la statuto de 'Fondaĵo Vanbiervliet'. Pluraj volontuloj tie laboras po dum kelkaj tagoj en monato, i.a. Hugo Rau, Pierre De Backer, Joost Vander Bauwhede kaj Leo De Cooman. La lasta, kunlabore kun aliaj, publikigis provizoran katalogon ĉe http://users.telenet.be/griza_leono. La celo estas iam integri la katalogon en la ĝeneralan katalogon de flandriaj bibliotekoj.

La fondaĵo ankoraŭ estas lokumita en la urba publika biblioteko de Kortrejko kaj tiu biblioteko ankaŭ prizorgas la bindadon de la revuaj kolektoj. Ĉi-momente estas preparata interparolo kun la antaŭ nelonge nomumita biblioteka direktoro. Je mezlonga tempospaco la biblioteko estas translokumota en novan konstruaĵon.

Hispanio (Roland Rotsaert)

Post la forpaso de Luis Hernandez Yzal en februaro 2002 la situacio de la Hispana Esperanto-Muzeo (HEM) (Sant Pau d'Ordal, en la ĉirkaŭaĵo de Barcelona) iĝis malklara. De partoprenanto al hispana kongreso oni aŭdis, ke grupo vizitis HEM dum tiu kongreso. Pliaj informoj ne estas, sed ŝajnas, ke la filo de la fondinto, kiel promesite, malfermas HEM-n laŭ interkonsento.

R. Rotsaert havas katalogon (en *dBase*) de la libro- kaj revukolektoj de HEM ĉirkaŭ 1995-1996. Li pripensas eblon ĝin publikigi per interreto. Problemo estas la amplekso (po ĉirkaŭ 4 Mb).

En la sama regiono (Moiá) troviĝas alia grava Esperanto-biblioteko: 'Ramon Molera Pedrals'. Estis regulaj kontaktoj kun HEM. La kolekto estas plue prizorgata de Ana Maria Molera, la filino de la fondinto. La lasta kontakto datiĝas de la komenciĝo de 2002.

Dresden (Wolfgang Schwartz)

Dum la dua mondmilito Dresden estis tute detruata, sed multe da materialo konserviĝis en la ĉirkaŭaĵo de la urbo kaj interesaj dokumentoj ankoraŭ nun estas regule trovataj.

La kolekto estas lokumita en la centro 'Marie Hankel' (verkistino kaj poetino, 1844-1929). La dokumentoj (fotoj, gazetaj artikoloj, leteroj…) ankaŭ gravas por la loka historio (de la laborista *kaj* de la burĝa klasoj) kaj estas interŝanĝoj kun folkloristoj. La grandaj problemoj estas la financado de la centro kaj la katalogado/konsultado de la kolektita informo.

Centra katalogo

Laŭ Detlev Blanke la problemo jam dekjarojn estas konata: unu centra, tutmonda katalogo de libroj kaj revuoj evitus, ke ĉiu biblioteko ĉiam denove devas registri la bazajn donitaĵojn de ĉiu dokumento. Pasintece la kunlaborado malsukcesis, ĉar ĉiuj grandaj kolektoj jam havis sian propran (profesie faritan kaj plejofte de superaj instancoj imponitan) sistemon kaj ne povis aŭ volis rezigni pri ĝi.

Roland Rotsaert pensas, ke interreto prezentas novajn eblojn. Grupo da volontuloj povus, kunlabore kun la eldonistoj, tuj registri ĉiujn nove aperintajn librojn kaj revuojn (kondiĉe ke por ambaŭ specoj de publikaĵoj ekzistas internacie akceptita katalogada metodo – esplorende). Tio povas esti la bazo de virtuala librokomerca kaj abona servoj (ambaŭ agadoj nun estas praktikataj ne-efike en esperantaj rondoj).

Bibliotekoj povus baziĝi sur tio por registri siajn novajn akiraĵojn. En posta fazo ĉiuj jam publikigitaj verkoj povus esti aldonataj. Centra katalogo ankaŭ igus ebla kaj sencoplena la serĉadon de eraroj: ekzemple misliterumo de aŭtoro, eldonejo, eldonloko… Koncerne revuojn ankaŭ la enhavo povus esti malfermata.

Informfontoj

Surpaperaj:

Vojoj al faka literaturo (Detlev Blanke, UEA, 2003)
Bibliografio de Internacia Lingvo (Petro Stojan, Georg Olms Verlag, 1973)
Enkonduko en Libroscience de Esperanto (R. Haupenthal, 1972?)

Interretaj:

Elektronika Bibliografio de Esperantaj Artikoloj, EBEA je www.esperantoland.de/ebea (Bernard Pabst, retrobibliografio; detalaj informoj pri EBEA estas je www.interlinguistik-gil.de/ebealink.html)
Biblioteko de vortaroj je www.uea.org/dokumentoj/bib/index.html

Brokante

Ofte Esperanto-eldonaĵoj troveblas (kaj laŭdezire aĉeteblas) en retejoj kiaj www.ebay.com, www.zvab.com en www.abebooks.com.

Konkludoj

Malgraŭ vasta diskonigado de la seminario la nombro da partoprenantoj tamen estis malgranda. Tamen ĉiuj ĉeestantoj trovis la iniciativon tre instrua kaj ili taksas utile ripeti la seminarion venontan jaron. Jam dum la universala kongreso en Vilno kunveno de bibliotekistoj povus esti organizata.

Ĉar ĉiuj partoprenantoj havas multajn aliajn taskojn, estos serĉata iu ekster la grupo por prizorgi la kunordigon. Unua tasko povus esti la starigo de Yahoo-grupo.

Ofte oni plendas pri manko de mono, sed fakte estas sufiĉe da monrimedoj. Precipe mankas la bonaj projektoj. La propono kaj defendo de projekto ĉe subtenonto kaj la posta administracia kontrolo estas specialistaj taskoj kaj prefere estu farataj de alia persono ol tiu, kiu ellaboras la projekton.

---

[1] Por belgoj interesa anonco en ĝi estas la 'Esperanto-Katalogo' (27 paĝoj) farita de iu Coen en 1957 por Mundaneum. En la SAT-jarlibro de 1929-30 estas menciata iu Jean Coen el Schaarbeek. Pri Mundaneum aperis artikolo en Monato de marto 2004, p. 17-18.
[2] En 2004 estis publikigita konciza historio de la grupo: '100 Jahre der Zeit voraus' (kun codoromo).